

František Emanuel Velc (1816-1890)

Antaŭ nelonge mi serĉis iun libron en mia libroŝranko kaj hazarde mi ekvidis libron de Alois Jirásek "Diversaj prozaĵoj", en kiu mi komencis foliumi. La plej longa teksto estis "El rememoroj de solemulo" pri forgesita patrioto František Emanuel Velc, kiu postlasis manuskripton kun rakontado pri sia vivo kaj precipe pri la sangoplena revolucia jaro 1848 en Prago, kiun li propraokule travivis. Alois Jirásek tralegis la manuskripton kaj prezentas ĝin al la publiko kun multaj aŭtentaj citaĵoj el la plumo de Velc.

Ankaŭ al mi ŝajnis la teksto interesa kaj mi tralegis ĝin preskaŭ unuspire. Tial mi decidis prezenti la interesan forgesiton unue en Vikipedio kaj nun ankaŭ en nia klubo.

František Emanuel Velc naskiĝis la 2-an de februaro 1816 en Litomyšl kiel filo de negocisto. En la sama urbo li studis gimnazion (1832) kaj filozofion (1833), poste en Vieno juron. Fininte la studadon, li laboris kiel edukisto en nobelaj domoj kaj estis sekretario de mecenato Antonín Veith, mastro en Liběchov. Post pluraj jaroj kun bona emerita pensio li revenis en sian naskiĝan regionon, sed ne en sian naskiĝan urbon. Li ekloĝis en Česká Třebová ĉe medicina doktoro Rybička, kun kiu li amikiĝis antaŭ jaroj jam kiel studento en Vieno.

En Česká Třebová li vivis multajn jarojn, sed poste li decidis forlasi la homan societeton kaj transloĝiĝi al solejo en Kozlov, kie li vivis kiel ermita filozofo ĝis sia morto la 30-an de novembro 1890. Li forpasis kiel 74-jarulo. La posedanto de dometo, en kiu li vivis, promesis al li kremacii lian korpon sur monteto de Kozlov, sed la promeson li ne plenumis. Velc estas entombigita en Česká Třebová. La tombon prizorgis la urbo Litomyšl, al kiu li testamentis sian bibliotekon kun verkoj juraj, natursciencaj kaj filozofiaj. La ĉehajn librojn el la sama biblioteko li testamentis al la komunumo Kozlov.

Dum siaj lastaj jaroj li ne kontaktis kun siaj parencoj kaj tial li estis surprizita, kiam sur la pordon de lia dometo frapetis du junuloj, el kiuj unu estis nepo de lia frato. Li hezitis malfermi, sed post plurfoje ripetita frapado, li malfermis. La junuloj vidis viron pli ol sesdekjara, maldikan, sed fortikan, kun rimarkindaj trajtoj. Li havis kurte tonditajn lipharojn, sed longan, ondumitan kaj tre densan grizan hararon, surhavis negliĝan mantelon zonitan per ŝnurego, kaj brunan frotuzitan peltoĉapon. La atenton tiris la negliĝa mantelo kun multaj flikaĵoj, sub kiu estis videbla modele blanka ĉemizo. Sur same blanka tablotuko kuŝis skribiloj kaj malfermita libro. En la ĉambro estis simpla lito kaj ĉe la muroj bretaroj plenaj de libroj.

La junuloj demandis lin, kion li legas, kaj li respondis, ke li trovis multe da vero en budaismo kaj ĉe Spinoza kaj ke li legas tre multe. Kiam ili ne sciis plu, pri kio paroli, ili adiaŭis lin kaj foriris. Sed erarus, kiu opinius, ke li estis grumblulo aŭ hom-emitulo. Male, li akmikis kun Bolzano, Klácel, Rieger, Frič, Šembera kaj aliaj eminentuloj. Liaj rememoroj estis verkitaj en du libroj. La unua traktas jarojn 1830 ĝis 1848, la dua libro la jaron 1848 mem. Eble ekzistis ankoraŭ tria libro, sed tiu ne

estis trovita aŭ Velc ne havis sufiĉe da tempo por ĝin verki.

Post studado Velc fariĝis edukisto ĉe grandkomercisto Mosig en Vieno kaj de tie li ricevis postenon eduki infanojn de grafo Kalnoky en Letovice. La grafo estis sovaĝa viro, kiu ofte enmiksiĝis en la instruadon per nekleraj intervenoj kaj eĉ batis siajn infanojn tiel, ke ili veis ruliĝante sur la planko sub liaj piedoj. Ĉiuj ĝojis, kiam la familio transloĝiĝis al Brno, kie Velc amikiĝis kun Klácel kaj František Sušil. La grafo maldungis lin kaj anstataŭ salajro skribis al li kalumnian leteron kaj denunciis lin ĉe polico, ke li estas danĝera politika patrioto. Lia amiko, ĉe kiu li lasis sian valizon, ektimis, kaj ĉiujn skribaĵojn bruligis. Tiamaniere Velc perdis leterojn de siaj gepatroj kaj aliajn dokumentojn, politike tute senkulpaĵn.

En 1840 Velc revenis al Vieno, kie li vegetis unu jaron, antaŭ ol li fariĝis edukisto de knabeto kaj knabineto de grafo Chorinský. Denove lin persekutis kalumnia letero de la grafo Kalnoky kaj Velc devis foriri. Fine li fariĝis sekretario de nobela familio Veith en Liběchovice. Komence de 1848 li transloĝiĝis al Prago kaj travivis la revolucian jaron.

Praganoj sendis al Vieno du deputaciojn postulantaj por la ĉeĥa nacio diversajn rajtojn en la ĉeĥaj regionoj. Vieno ŝajne plenumis ilin, en julio eĉ permesis slavan balon, kiun partoprenis eĉ princo Windischgrätz kaj ĉefprinco Karolo Ferdinando, sed kiam la popolo estis foriranta, atakis ilin soldatoj. La homoj diskuris hejmen kaj komencis konstrui barikadojn sur la strato. Ne ĉiuj praganoj estis patriotoj, estis inter ili multaj germanoj kaj hungaroj rekte malamikaj. Tial ekestis grandaj konfuzoj. Windischgrätz komandis bombardi la urbon kaj Velc vidis multajn mortantajn homoj. Kaj ankaŭ multajn heroojn. Soldatoj ofte estis kaŝitaj, kiam patriotoj sur barikadoj defendis la stratojn, sed kiam ili sukcesis trarompi la barikadon, ili traserĉadis la domojn kaj buĉis la homojn. Simile ili masakris vagonaron kun homoj, kiuj volis fuĝi el Prago. Kanonoj estis sur Petřín kaj de tie pafis kontraŭ la urbo.

Mi ne povas ĉi tie rakonti ĉiujn epizodojn, kiuj tie okazis kaj kiuj estas rakontataj sur 90 paĝoj. Sed mi rekomendas tralegi tiun duondokumentan rakonton, ĉar ĝi klarigos pri nia moderna historio multe pli ol lernolibroj, en kiuj estas nur skribite, ke la Viena registaro sange subpremis la ribelon.

Ni ankaŭ rememoru pri niaj forgesitaj patriotoj, ne nur pri František Emanuel Velc, sed ankaŭ pri aliaj, kiujn la rakonto mencias kaj piedpaĝe prezentas koncizan biografion. Bedaŭrinde mi nenie trovis portreton de Velc.

Miroslav Malovec